

Fenikso

Revuo de Esperanto Nederland

Jarkolekto 30 - n-ro 5/6



Septembro - Decembro 2025

Nederlando

75 jaroj da Esperanto-
instruado ĉe UvA

6

Nederlando

La vila mano: romano
de H.J. Bulthuis

9

Nederlando

Leteroj kiel suneroj
en kesto

11

Fenikso

Revuo de
Esperanto Nederland

Dumonata membrogazeto de Esperanto Nederland

ISSN 1384 - 6515



Membroj de Esperanto Nederland ricevas la gazeton. La jara kotizo en 2026 estas €41,50 por membroj pli ol 30-jaraj, €20,- por membroj ĝis 30-jaraj kaj €15,- por samhejmano.

Kunlaborantoj de Fenikso

Ĉefredaktoro: Paweł Fischer-Kotowski

Redaktoroj: Thijs van Viegen, Paweł Fischer-Kotowski

Korektantoj: Bert de Wit, Inge Demmendaal

Limdato: Materialo por la sekva numero estas bonvena **ĝis la 25-a de januaro 2026.**

Informoj pri Esperanto

Ineke Emmelkamp

Arubastraat 12, 9715 RW Groningen

info@esperanto-nederland.nl

050 571 88 42

Studosemajnfino/studieweekend

studosemajnfino@esperanto-nederland.nl

Esperanto Nederland enrete

<https://www.esperanto-nederland.nl>

<https://facebook.com/esperanto.nederland>

<https://t.me/EsperantoNederland>

Sendu viajn kontribuojn al

redakcio@esperanto-nederland.nl

Respondu al artikoloj per maksimume 200 vortoj.

La redakcio decidas pri la publikigo de la tekstoj.

Estraro

estraro@esperanto-nederland.nl

Prezidanto: Marc van Oostendorp

Nederlandse Taal en Cultuur

Radboud Universiteit Nijmegen

Postbus 9103, 6500 HD Nijmegen

prezidanto@esperanto-nederland.nl

Sekretario: Rob Groeneveld

Scharounlijn 44, 2728 BT Zoetermeer

06 19 77 35 27

sekretario@esperanto-nederland.nl

Kasisto: Kees Neeft

Van Alphenplein 84, 2353 CN Leiderdorp

kasisto@esperanto-nederland.nl

Estrarano: Peter van Noorden

Tamarixplantsoen 203, 1702 JD Heerhugowaard

peteravn@esperanto-nederland.nl

06 22 61 32 49

Estrarano: Ineke Emmelkamp

Arubastraat 12, 9715 RW Groningen

informado@esperanto-nederland.nl

Membro-administranto: Koos Scharroo

Vaartweg 24G, 8382 EB Frederiksoord

membroj@esperanto-nederland.nl

06 22 41 32 67

Ekz. informi pri (ŝanĝoj de) poŝtadreso, telefonnumero, retpoŝtadreso, (eks- kaj ali)membraĝo, pagmaniero ktp.

Pri sociaj komunikiloj

sociaj-komunikiloj@esperanto-nederland.nl

Bankkonto:

IBAN: NL 10 TRIO 0786 8441 67

Nome de Esperanto Nederland

Eventuala resendadreso/eventueel retouradres:

Esperanto Nederland Ledenadministratie

Vaartweg 24G, 8382 EB Frederiksoord


En la numero

Nederlando

75 jaroj da Esperanto-instruado	5
ĉe la Universitato de Amsterdamo	6
La vila mano	9
Informatiestand in Groningen	10
Leteroj kiel suneroj en kesto	11
Kie estas Heno?	14

Ceteraĵoj

Revuo-interŝanĝo	16
Ĉu metalo foje flosas sur akvo?	17
Enigmo	18
Antaŭfine	19



Sur la kovrilpaĝo

Bildo: Paweł Fischer-Kotowski

Sur la kovrilpaĝo troviĝas foto de la fasado de la Biblioteko de la Universitato de Amsterdamo. Ĝi montras la saman tekston en multaj lingvoj, ankaŭ en Esperanto: *Legu ĝin, ĝi ne diras kion ĝi diras*. En la Universitato de Amsterdamo oni instruas Esperanton jam 75 jarojn. Pri tio troviĝas artikolo en ĉi tiu *Fenikso*, vidu sur [paĝo 6](#).

Voorwoord

We hebben weer een volle *Fenikso* samengesteld. In het bijzonder staan we in dit nummer stil bij 75 jaar Esperanto-onderwijs aan de Universiteit van Amsterdam. Een vogelvlucht van al die jaren vind je vanaf [pagina 6](#).

Op [pagina 9](#) vind je een artikel over het boek *De taveerne van Piet Rabbel*, dat origineel in het Esperanto verscheen onder de titel *La vila mano*. In oktober dit jaar vonden de eerste officiële vertoningen plaats van een theatervoorstelling met poppen voor volwassenen op basis van het boek.

Ook leuk: in Groningen is een Esperantotunnel geopend in september. Kijk op [pagina 10](#) voor een artikel hierover.

Op [pagina 11](#) vind je een bijzonder artikel over in het Esperanto geschreven liefdesbrieven, die Marc van Oostendorp ontving met de vraag of hij ze naar het Nederlands wilde vertalen.

Verder vind je in deze *Fenikso* een bericht van overlijden ([pagina 15](#)), de Revuo-interŝanĝo ([pagina 16](#)) en andere onderdelen die je van de *Fenikso* gewend bent.

Dit nummer van *Fenikso* is het laatste nummer van 2025 (jaargang 30). Hoewel het officieel een dubbelnummer is, is het niet dikker dan normaal. Om het leesplezier niet te dempen, wil de redactie alle nummers van *Fenikso* in 2026 dikker maken.

Ook jouw bijdrage is altijd van harte welkom. Stuur gerust iets in als je iets leuks of interessants geschreven of meegemaakt hebt. Het geeft niet als er een (taal)foutje in de tekst staat. We denken als redactie graag met je mee.

Paweł en Thijs

De la estraro

La Fakultato de Lingvoj en la Universitato de Leiden kunlabore kun la reprezenta oficejo de la Eŭropa Komisiono en Hago organizis Foiron de Lingvoj la 26-an de septembro. Estis tabloj por multaj lingvoj. La Foiron partoprenis por Esperanto Federico Gobbo kaj Rob Groeneveld. Ili prezentis Esperanton al la publiko, interalie montrante multajn librojn en Esperanto kaj disdonante informmaterialojn. Almenaŭ unu partoprenanto de la studosemajnfino komence de novembro estis varbita en tiu Lingva Foiro.

Dum la Lingvofesto en oktobro en Utrecht estis varbita nova membro, kiu prelegos en la venonta jarkunveno. La Lingvofesto en 2026 okazos en Antverpeno.

En la studosemajnfino komence de novembro partoprenis 32 lernantoj.

Iama membro de NEJ, Dirk de Vries, alportis plurajn librojn en kaj pri Esperanto al nia asocio, kiuj estis prezentataj por kunpreno dum la studosemajnfino de novembro. Aliajn stokojn de libroj ni ricevadas de diversaj fontoj. Ni serĉas spacon por provizore deponi ilin. Ili devos esti pririgardataj kaj preparataj por transporto al la Reĝa Biblioteko aŭ alia arĥivo dum ili estas en deponejo. Kelkaj libroj estos

disponigataj al la membroj per la librolisto (vidu la rubrikon *Bonvenon*) aŭ prezentataj dum studosemajnfinoj.

La ĝisnuna *Strategia Plano* (nederlande: *Beleidsplan*) validas dum 2020–2025. Ties renovigo estos diskutata dum la venonta jarkunveno.

La estraro antaŭvidas Kulturajn Tagojn en Veghel la 13-an de junio 2026 kaj similan tagon en Wolvega en 2027.

Kandidatoj por la estraro estas serĉataj. Interesiĝantoj povos jam nun partopreni la estrarkunvenojn, kiuj plejparte okazas rete. Anoncu vin ĉe la sekretario.

Kun bedaŭro ni eksciis pri la forpaso de Rob Moerbeek la 27-an de novembro 2025. Poste aperos en Fenikso nekrologo pri Rob.

Forpasis ankaŭ Ed Borsboom, grava aktivulo por Esperanto en Nederlando, la 2-an de decembro 2025, en la aĝo de 89 jaroj.

Rob Groeneveld
sekretario

uea.facila

Ĉi-numere ni havas rekomendon por komencantoj. Eĉ se vi mem estas jam spertulo, eble vi konas iun, kiu nur antaŭ nelonge komencis sian aventuron kun Esperanto? Tiam vi povas rakonti al tiu persono pri la retejo uea.facila!

Temas pri retejo, kiu publikigas mallongajn artikolojn verkitajn en “facila” Esperanto – la tekstoj uzas limigitan vortprovizon. La listo de uzablaj vortoj konsistas el mil radikoj. Se la aŭtoro devas uzi vorton, kiu ne troviĝas en la listo, la signifo de tiu vorto estas klarigita tuj sub la teksto (ankaŭ en Esperanto).

La retejo uea.facila estas iniciato de Anna Löwenstein, brita esperantistino, verkisto (i.a. *La ŝtona urbo*, 1999), redaktoro de *Sekso kaj Egaleco* (1979–1988), akademiano (ekde 2001) kaj granda favoranto de bonlingvismo, purisma uzo de Esperanto.

 uea.facila.org



uea.facila
FACILAJ ARTIKOLOJ EN ESPERANTO

Bonvenon!

Er is 1 persoon lid geworden sinds het vorige nummer van *Fenikso*:


Luis Miguel Rojas Berscia woont in Arnhem. Wij hebben hem ontmoet tijdens het Taalfeest in Utrecht.

Van harte welkom! Wij hopen (weer) kennis met je te maken tijdens het studieweekend van 22–24 mei 2026.

Leden – en andere belangstellenden – kunnen via Ineke Emmelkamp een lijstje krijgen met Esperanto-boeken. Deze boeken hebben wij gratis gekregen van mensen die nu niets meer aan Esperanto doen. Leesboeken en leerboeken! Er is ook een aantal CD's en DVD's beschikbaar. Boeken, CD's en DVD's zijn wel tweedehands!

Je betaalt alleen de verzendkosten. Stuur een mailtje als je belangstelling hebt (✉ informado@esperanto-nederland.nl). Nieuwe leden kunnen gratis het grammaticaboek van Roel Haveman en Arjen-Sjoerd de Vries ontvangen. Alleen de verzendkosten worden berekend. Ben je al langere tijd lid en ligt je boek door veel gebruik uit elkaar? Dan kun je ook een nieuw exemplaar bestellen. Nieuwe deelnemers aan het studieweekend kunnen ook een exemplaar krijgen tijdens hun verblijf in Krikkenhaar.

Rob Groeneveld, secretaris



Esperanto
Grammatica met oefeningen
Roel Haveman
en Arjen-Sjoerd de Vries

Over het boek
Esperanto. Grammatica met oefeningen
Roel Haveman,
Arjen-Sjoerd de Vries
ISBN: 9789062831449

Gratis voor nieuwe leden.

Transdono de arkivaĵoj al la Esperanto-muzeo en Vieno

Je la 25-a de julio, unu tagon antaŭ la komenco de la Universala Kongreso en Brno, mi vizitis Bernhard Tuidler, direktoron de la Esperantomuzeo de la Aŭstria Nacia Biblioteko.

Mi transdonis al li miajn albumojn kaj personajn taglibrojn pri la Infanaj Kongresetoj en la 50-aj kaj fruaj 60-aj jaroj. Mi aldonis koverton kun fotoj pri kelkaj aliaj Esperanto-kongresoj.

Cetere mi transdonis ankaŭ kelkajn arkivaĵojn de la Esperanta familio Tavchar, kun infanlibro, kiujn sendis al mi Nika Rozej, unu el la infanoj Tavchar, kiu partoprenis kun mi en multaj Infanaj Kongresetoj. Post multaj jaroj mi denove renkontis ŝin dum la UK en Torino en 2023.

Benata Hengstmengel-Koopmans



1950 - 2025

75 jaroj da Esperanto-instruado ĉe la Universitato de Amsterdamo

Ĉi-jare ni festas la 75-jaran ĉeeston de Esperanto en la Universitato de Amsterdamo. Ĉeesto tre aktiva, ĉar nia lingvo estas ĉiujare lekciata al kelkdeko da amsterdamaj studentoj. La aventuro, komencita de la rumano Sigismundo Pragano en 1950, daŭras ĝis hodiaŭ. Praganon sekvis kvar nederlandaj kolegoj – Adriana Middelkoop, Rob Moerbeek, Marc van Oostendorp kaj Wim Jansen – kaj ekde 2014 la italo Federico Gobbo.

Fenikso ĝojas prezenti historian trarigardon verkitan de Loes Demmendaal.

Jam post la pretigo de la artikolo, mallonge antaŭ la fermo de la numero, atingis nin tre malĝoja novaĵo pri la forpaso de Rob Moerbeek (1936–2025), kiu estis privat-docento en UvA dum dudek jaroj, inter 1987 kaj 1998. La nekrologo pri Rob kaj personaj rememoroj pri li aperos en la venonta numero de *Fenikso*.

Pragano, pioniro de la Amsterdama Universitato

Sigismundo Pragano (Sigmund Prager, 1907–1966) naskiĝis en Rumanio, kie li studis juron en la Universitato de Bukareŝto. Li eklernis Esperanton en la Esperanto-Centro Rumana en 1923.

En 1931 li venis al Nederlando, laŭ peto de Andreo Cseh, kiel instruisto de la Internacia Esperanto-Instituto (IEI) en Hago kaj fariĝis unu el la plej popularaj kursgvidantoj en diversaj landoj. Dum la dua mondmilito Pragano devis vivi kaŝe pro la fakto, ke li devenis el juda familio. Tio okazis unue en Hago, poste en Deventer kaj inter 1942 kaj 1945 li loĝis en Ede.



La 1-an de februaro 1950 Pragano komencis labori en la Universitato de Amsterdamo. Li estis sensalajra kandidat-asistanto en portempa servo ĉe la fako Literaturo kaj Filozofio, por doni lecionojn en la rumana lingvo kaj Esperanto. Ekde la 16-a de septembro li estis salajrata kandidat-asistanto, dungita duontempe. Li gvidis ĉiusemajne lecionon de

Esperanto-kurso, por kio li ricevis honorarion. La 15-an de novembro li fariĝis oficiala asistanto. En 1957 li iĝis scienca oficisto en fiksa servo (duontempe) kaj en 1961 li iĝis scienca oficisto unua-klasa (plentempe). Ĉiusemajne li instruis dum tri horoj: unu horon por komencantoj laŭ la Cseh-metodo, unu horon pri literaturo kaj unu horon pri parola kaj skriba kapablecoj.

Pragano forpasis jarfine de 1966.

Adriana J. Middelkoop

Du jarojn poste lic. A.J. Middelkoop (1913–2009) fariĝis privat-docento ĉe la Universitato de Amsterdamo. La 29-an de aprilo 1969 je la akcepto kiel privat-docento ĉe la Universitato ŝi donis publikan lecionon sub la titolo: *Humuraj trajtoj en la Esperanto-literaturo*. De la 1-a de januaro 1969 ĝis la fino de la kursojaro 1977–1978

ĉiusemajne ŝi donis lekciojn por tri grupoj. La elementa grupo lernis gramatikon kaj ekzerciĝis pri konversacio, la meza grupo okupiĝis pri parolkapablo, tradukado, gramatiko kaj literaturo. Dume la supera kurso okupiĝis pri gramatikaj kaj literaturaj temoj ĝeneralaj kaj Esperantaj, teorio kaj praktiko de tradukado. S-ino




Middelkoop verkis artikolojn i.a. pri leksikografio kaj terminologio. Ŝi estas konata ankaŭ pro la vortaro *Nederlands-Esperanto-Nederlands* eldonita en 1971 de la konata nederlanda eldonejo Prisma. La dua reviziita eldono aperis en 1986.



Rob Moerbeek

Ekde septembro 1978 lic. Rob Moerbeek (1936–2025) transprenis la taskon de privat-docento ĉe la Universitato. Ankaŭ li donis tri kursojn. Por komencantoj li uzis la lernolibron de Zondervan kaj Manders kaj i.a. *Gerda malaperis!* de Claude Piron kaj *Krestomatio de Esperanto*. Dum en la konversacia horo estis utiligata la legolibro de Marjorie Boulton *Faktoj kaj fantazioj* sed oni tuŝis ankaŭ gramatikajn temojn. La spertulojn streĉis kaj distris la libro *Vivo kaj opinioj de Majstro M'Saud*. Rob Moerbeek lekcis ĝis la 27-a de majo 1998.



La organizo *Esperanto bij Onderwijs* kiu ebligis la Esperanto-instruadon ĉe la Universitato sukcesis en 1998 transformi la privat-docentan postenon (sensalajran) al eksterordinara katedro pri interlingvistiko kaj Esperanto (salajrata). Ĉefa motoro estis Hans Erasmus.

Marc van Oostendorp

La unua universitata profesoro estis d-ro Marc van Oostendorp (1967–). Li unuafoje lekcis sub la titolo *Kiel eble plej facila lingvo* je la 9-a de aprilo 1998. Por la interlingvistika kurso Marc van Oostendorp proponis superrigardon de la lingvaj problemoj en la nuna Eŭropo, historion de la interlingvistika movado ekde la 17-a jarcento,



analizon de la plej gravaj planlingvoj (Esperanto, Interlingua, Ido, Glosa kaj Volapük). La kurso estis tre intensa. Pristudinte la materialon la studentoj ricevis oficialajn universitatajn poentojn. Li restis la katedrulo ĝis 2001.

Wim Jansen



En februaro 2002 transprenis la laboron inĝ. Wim Jansen (1948–2024). La studoj enhavis tri komponantojn: teoria lingvistiko pri la strukturo de lingvoj, psika lingvistiko pri la ebloj de lingvoj kaj socia lingvistiko pri la funkciado ene de la socio. Wim Jansen kutimis diri, ke li ne instruas Esperanton nek esperantologion, sed ke li instruas interlingvistikon ĉe kiu

li komparas ĉion kun Esperanto kaj mezuras per Esperanto. Li komparis la solvojn, kiujn donas planlingvoj, kun aliaj solvoj. Li donis atenton ankaŭ al Ido kaj Interlingua. Wim Jansen sukcesis ankaŭ aranĝi staĝojn por la studentoj en la Universala Kongreso en Pekino. Ankaŭ per tiuj staĝoj la studentoj povis akiri universitatajn poentojn. Krom okupiĝi pri instruado li esploris la Esperantan sintakson. La 1-an de novembro 2009 Jansen fariĝis la formala katedrulo/profesorino ĉe la Universitato, post kiam li doktoriĝis pri la sintakso de Esperanto (ankaŭ en la Universitato de Amsterdamo). Lia disertacio estas unu el du en Nederlando pri Esperanto (la alia estis *Vijf kunsttalen* – Kvin artefaritaj lingvoj – de W.J.A. Manders el 1947 ĉe la Universitato de Utrecht). Wim Jansen gvidis la laboron ĝis 2013.

En 2004 *Esperanto bij Onderwijs* kunfandiĝis kun Internacia Esperanto-Instituto, kiu ekde tiu tempo respondecis pri la katedro kaj ĝia financado dum Esperanto Nederlando kunfinancis la katedron. En la jaroj 2008–2012 Esperanto Nederland subvenciis ĝin ĉiujare per 5 000 eŭroj.

Ekde 2013 Internacia Esperanto-Instituto ĉesis subvencii la katedron. Universala Esperanto-Asocio helpe de Esperanto Nederland garantiis ĝian pluan funkciadon.

Nederlando

En la jaroj 2013–2017 Esperanto Nederland garantiis ĉiujare 10 000 eŭrojn.

En la jaroj 2018–2023 Esperanto Nederland subvenciis la katedron ĉiujare per 3 000 eŭroj kaj aldone ĝi kolektis monon ĉe la membroj (sume 25 132 eŭroj).

En la jaroj 2024–2029 Esperanto Nederland subvencias la katedron per 2 000 eŭroj jare, aldone ĝi kolektas monon (ĝis inkluzive 2024: 16 103 eŭroj) ĉe la membroj kaj instigis aliajn landajn asociojn de UEA al kunfinancado, kunlaboras pri tio landaj asocioj el Svedio, Germanio, Italio kaj Svislando.

Federico Gobbo

La 1-an de februaro 2014 d-ro Federico Gobbo (1974–) transprenis la katedron. Lia inaŭgura parolado (trilingva) okazis la 13-an de marto 2015 sub la temo: *Interlinguïstiek, een vak voor meertaligheid /*

Interlingvistiko, fako por multlingveco/ Interlinguistics, a discipline for multilingualism.


Liaj ĉefaj esplorinteresoj estas lingvopolitiko kaj lingvoplanado kaj konstruiva lingvistiko. Gobbo gvidas en la universitato du kursojn: lingvokurson por komencantoj kaj kurson pri interlingvistiko en kiu li traktas i.a. internaciajn lingvajn problemojn kaj la analizon de artefaritaj lingvoj (ne nur de Esperanto, sed ankaŭ



ekzemple de la lingvoj de Tolkien). Ambaŭ estas oficialaj kursoj de la universitato.

Federico Gobbo kreis novspecan internacian lernolibron por uzo en universitatoj – *Amikaro*.

Lernolibro de Esperanto – kiun li uzas ankaŭ en la Universitato de Amsterdamo.



Nota: Kelkloke oni mencias 1948 kiel la unuan jaron de la Esperanta-instruado ĉe la Universitato de Amsterdamo. Bedaŭrinde nenie mi trovis informojn, kiuj povus tion konfirmi.

La unuan spuron mi trovis en *Scienca Revuo* 2,8 (1950) (<https://scienca-revuo.info/article/1193>)

Kompilis Loes Demmendaal helpe de Marc van Oostendorp kaj Federico Gobbo kaj diversaj artikoloj i.a.

A.J. Middelkoop, *Komuna Esperanto-Gazeto*, junio 1978; R. Moerbeek, *Komuna Esperanto-Gazeto*, decembro 1985; *Fenomeno*, aprilo 1994 kaj junio 1994; Marc van Oostendorp, *FEN-X*, 1998/3; J.K. Hammer, *FEN-X*, 2002/6; *Intervjuo de Radio Varsovio kun Wim Jansen*, en: *FEN-X*, 2005/5; Wim Jansen, *FEN-X*, 2006/1; *Raporto pri la Amsterdama Katedro*, en: *FEN-X*, 2009/2; Gerrit Berveling, *Fenikso*, 2015/3; Federico Gobbo, *Fenikso*, 2015/6; Vikipedio

Nova fasado de la Universitata Biblioteko



Sur la kovrilfoto ni prezentas ĉi-foje la fasadon de la nova konstruaĵo de la Biblioteko de la Universitato de Amsterdamo, kiu estas malfermita la 1-an de septembro 2025. La konstruaĵo troviĝas en Universiteitskwartier, ĉe Vendelstraat en Amsterdamo.

La impona konstruaĵo kunigas historian heredaĵon kun moderneco. La interna rearanĝo respondas la novajn bezonojn de la nunaj studentoj – ekzemple pli da malgrandaj spacoj por (komuna) studado anstataŭ grandaj haloj: 1100 studlokoj, 12 kunlaboraj spacoj kaj 14 studkabinetoj por lerni en silento, aldone 900 biciklaj parklokoj. La tuto konservas la etoson de tradicia biblioteko, kun ĉirkaŭ 300 mil (fizikaj) libroj.

Aparte interesa por esperantistoj estas la fasado, videbla ankaŭ sur la apuda foto. Ĝi prezentas version el la poemo *Awater* (1934) de Martinus Nijhoff (1894–1953): *Lees maar, er staat niet wat er staat*. Tiu frazo aperas aldone tradukita en 24 lingvojn, inter ili en Esperanton: *Legu ĝin, ĝi ne diras kion ĝi diras*.

La vila mano

Tiu ĉi romano, *La vila mano*, estas originale verkita en Esperanto. Ĝi estis verkita en 1928 de Hendrik Jan Bulthuis (naskiĝis la 15-an de septembro 1865, mortis la 27-an de aprilo 1945). Li naskiĝis en la vilaĝo Warffum, kie disvolviĝas la intrigo de la romano. En 1977 aperis la nederlanda traduko: *De taveerne van Piet Rabbel*.

Tiu ĉi romano estas la bazo de pupteatra prezentaĵo por plenkreskuloj. Dum la festivalo Noorderzon mi jam vidis mallongan prezenton. Alloga prezento!

La oficiala unua prezento okazis la 25-an kaj 26-an de oktobro 2025 en la Kunstkerk het Hoogeland en Warffum. La 30-an de oktobro ĝi okazis en *Grand Theatre* en Groningen.

Apud ĉiuj prezentoj okazis ankaŭ kelkaj flankaj programeroj, kiel promenado tra Warffum, vizitado de kelkaj lokoj menciitaj en la libro. Teksto el la libro estis voĉlegita en la nederlanda kaj en Esperanto. Aldone estis ankaŭ malgranda ekspozicio pri Hendrik J. Bulthuis kaj pri Esperanto.


Jam antaŭe okazis mallonga prezento pri Esperanto en du bazlernejoj. La lernantoj esprimis siajn dezirojn kaj mi tradukis ilin en Esperanton. Sub la gvido de grafikistino ili preparis belajn grafikaĵojn. El ili oni poste faris poŝtkartojn por disdoni dum la prezentoj. Ĥoro kantis, ĝi pretas nun kanti almenaŭ unu strofon en Esperanto. Arjen-Sjoerd anticipe kontrolis la tekston. Ankaŭ la kantgrupo Kajto prezentiĝis!

Kaj pri la projekto mem. La projekto okazos sub la gvido de Lenny Bulthuis, kiu malgraŭ la nomo ne estas parenco de Hendrik Jan. En la programo de *Common Grand* de la *Grand Theatre* en Groningen konekto inter urbo kaj provinco estas grava. Speciala atento estas por la sociaj diferencoj. La elirpunkto estas lokaj rakontoj. La grupo Esperanto Noord-Nederland prizorgas la Esperanto-flankon de tiu ĉi projekto.

Pliajn informoj pri Bulthuis serĉu en Vikipedio.

Ineke Emmelkamp

sekretario de Esperanto Nord-Nederlando



Informatiestand in Groningen



Op 13 september 2025 werd in de stad Groningen officieel het nieuwe Zuiderplantsoen geopend als onderdeel van de afronding van het project Aanpak Ring Zuid. Er was al heel lang een Esperantostraat, maar nu is er ook een Esperantopad en een Esperantotunnel. Dit op eigen initiatief van de gemeente! De straatnaambordjes moeten nog geplaatst worden! Welke stad in Nederland heeft drie plekken met een Esperanto-naam?

Het Esperanto-pad is voor fietsers en wandelaars. Het pad loopt onder de eveneens nieuwe Esperantotunnel door en verbindt twee delen van het nieuwe plantsoen. Het zorgt voor een veilige groene verbinding tussen twee wijken. En dat alles bevindt zich boven de lawaaiige en milieuvervuilende auto's op de rondweg diep onder de grond.

Het past mooi bij het idee achter de taal Esperanto. Esperanto staat ook voor het streven naar veiligheid, verbinding en een groene harmonieuze schone wereld.

Tijdens de Zomermarkt heeft Esperanto Noord-Nederland een informatiestand kunnen regelen. Van 13.00 tot 17.00 uur kwamen er honderden mensen langswandelen. Het was gemakkelijk om met hen in gesprek te komen. We maakten de bezoekers van onze stand erop attent dat ze op het Esperantopad liepen. *Weet je wat Esperanto is?* Soms kregen we positief antwoord en konden we vertellen wat we nu doen. Enkelen hadden vroeger Esperanto geleerd. Als ze antwoordden dat ze nog nooit van Esperanto hadden gehoord, konden Johan, Andries en ik ons verhaal doen. Soms geholpen door andere esperantisten die langskwamen. Veel foldertjes uitgedeeld en de mensen gewezen op de QR-code op het drie-meterlange spandoek achter ons!

Ineke Emmelkamp

secretaris Esperanto Noord-Nederland

Feest van DJ Kaan: Nederlands als wereldtaal?

Aan de Tweede Kamerverkiezingen van dit jaar deden veel verschillende partijen mee. Een van de meer opmerkelijke partijen ditmaal was de partij *Feest van DJ Kaan*. Op de website, die nu overigens al uit de lucht is gehaald, stond de missie van de partij als volgt opgeschreven:

"Onze missie? Iedereen de Nederlandse taal leren, gelijke kansen bieden en hoop terugbrengen waar die verloren is. Wij geloven in een nieuwe wereld – en wij gaan haar samen maken."

De partij legde veel focus op onderwijs en zag het als missie om het Nederlands als wereldtaal op de kaart te zetten. Dat dat niet resoneerde is duidelijk gebleken. Overigens kennen wij wel een taal die veel beter geschikt is voor internationale communicatie. Maar Esperanto zien we dan weer niet terug in verkiezingsprogramma's...



Leteroj kiel suneroj en kesto

Antaŭ kelkaj jaroj, Marc van Oostendorp ricevis viziton de du nederlandaj sinjorinoj, kiuj alportis al li stakon da amleteroj skribitaj en Esperanto, kun la peto traduki ilin. Ilia nederlanda patro ricevis tiujn leterojn en la tridekaj jaroj, de sia itala amikino. La leteroj rakontas la historion de granda amo, kiun ilia patro ŝajne neniam forgesis – amo, kiun interrompis la faŝismo.

“Viaj leteroj kiel suneroj brilos en mia vivo.” Tiel skribis la juna italino Ada Magnina en januaro 1934 al Eduard Bakker, nederlanda maristo, kiun ŝi renkontis kelkajn monatojn pli frue en la esperantista klubo de Ĝenovo en Italujo. La frazo, skribita per eleganta, preskaŭ kaligrafia manskribo, elstaras sur la unua paĝo de la unua letero en kolekto de preskaŭ cent, kiun mi ricevis antaŭ kelkaj jaroj de la du filinoj de Eduard. Post lia morto ili trovis la leterojn kaŝitajn en kesto, kaj ili petis min traduki la tekston – mi estis la sola, kiun ili konis, kiu povis legi la internacian lingvon. Kiel dankon mi rajtis konservi la leterojn.

Post la afero kun Ada, Eduard edziĝis al ilia patrino kaj neniam rakontis pri la antaŭa amo. Liaj filinoj apenaŭ eĉ sciis, ke li iam parolis Esperanton. Tamen li konservis la leterojn dum jardekoj. Ni havas nur la leterojn, kiujn li ricevis, ne tiujn, kiujn li verkis – ni havas la voĉon de Ada, sed ne la respondon de Eduard. Tamen eblas legi la tutan

rakonton inter la linioj: de la unua brilo de amo ĝis la silento de disiĝo. Kaj ĉion ĉi sur la fono de unu el la plej mallumaj epokoj de la eŭropa historio: la leviĝo de faŝismo.

Eduard Bakker ŝajne ne estis konata aktivulo en la nederlanda Esperanto-movado (li ne estis parenco de Hans Bakker). Lia intereso pri la lingvo eble estis ĉefe privata afero – parto de lia kleriga vojaĝo dum studoj por fariĝi ŝipoficiro. Dum sia restado en Ĝenovo en la frua printempo de 1933, li vizitis la lokan Esperanto-klubon – kiu havis propran domon en la urbo – kaj tie li renkontis Ada. Ĉirkaŭ kristnasko li verŝajne revenis por resti ĉe amikoj de la familio – tranokti ne-edziĝinte, eĉ se Ada ankoraŭ loĝis ĉe siaj gepatroj, verŝajne estus invito al eteta skandalo en la domo kie la familio loĝis.

Ada Magnina, instruistino pri la itala kaj franca lingvoj, estis inteligenta, sentema kaj eleganta. Ŝi ne nur vizitadis la Ĝenovan Esperanto-klubon, sed ankaŭ verkis por itallingvaj kulturaj revuoj. Ŝia unua letero, datita je januaro 1934, estas plena je pasia amo: “Viaj leteroj kiel suneroj brilos en mia vivo. Ankaŭ vi, mia Eduard, restu certa pri mia amo, mia fideleco, mia atendo”, ŝi skribis. Ŝi parolis pri sia soleco, pri la manko de vera kompreno ĉe siaj samurbanoj: “Neniu komprenas min tiel bone kiel vi!”



Nederlando

Ŝi priskribas siajn sonĝojn, la promenadojn tra Ĝenovo, kaj la senton de perdo post la foriro de la nederlanda maristo. Ŝi inkludigas detalojn, kiuj donas vivecon al la leteroj: "Pasintan nokton mi revis, ke vi revenis viziti min kaj preferis miajn harojn ĉiujn ondigitajn!" En aliaj leteroj ŝi estas pli filozofia: "Antaŭ via alveno, preskaŭ sufiĉis viaj leteroj por feliĉigi min. Antaŭe mi neniam spertis vian longan ĉeeston, sed nun mi konstatis, ke viaj leteroj ne estas por mi plena feliĉo, ĉar granda feliĉo ekzistas nur apud vi."

Ada skribas flue, kun nur maloftaj gramatikaj eraroj. Ŝi ŝajne lernis la lingvon per korespondado, kaj tamen jam komence de la interŝanĝo ŝi atingas altan stilnivelon. Ŝiaj frazoj montras ne nur la forton de ŝiaj sentoj, sed ankaŭ la estetikon de la epoko. Ĉiu letero estas artverko – per vortoj, per manskribo, per enmetitaj floretoj. La Esperanto de Ada estas flua kaj nuancoplena. La leteroj parolas pri soleco, pri espero, pri la interspaco inter leteroj kaj la deziro je fizika ĉeesto. Ili parolas ankoraŭ nun rekte al la leganto.


La plej frapa trajto de la leteroj tamen estas la interplektiĝo inter la sferoj persona kaj politika. En tiu tempo, la faŝisto Benito Mussolini jam estis la *Duce* (Gvidanto) de la ŝtato Italujo. Jam en printempo 1934 Ada skribas: "Hodiaŭ, kiel ĉiujare, forveturas la rekrutoj por la milita servado. Ili kantas gajajn kantojn adiaŭante la familianojn kaj siajn


knabinojn." Ŝi priskribas la scenon kun respekto kaj sento: "La esperoj de la Patrujo ekmarŝas al la nova vivo."

En majo 1934 ŝi entuziasmas pri sportaj virinoj: "La *Duce* donas multon al sportaj virinaj okazaĵoj, ĉar li volas, ke la itala virino estu forta por doni al la Patrujo multnombrajn infanojn. [...] Pasinte virinoj estis tro sklavecaj." En septembro ŝi priskribas grandan amasan geedziĝon en Romo, organizitan de la reĝimo: "La *Duce* oferis al ili festenon, dancon k.t.p., ĉion senpage, ankaŭ la vojaĝon."

En oktobro 1934 ŝi rakontas pri denunco kontraŭ ŝia patro, kiun najbaroj akuzis pri kontraŭfaŝismaj ideoj: "Sufiĉus, ke *Papá* [Paĉjo] havus pasintan politikan mankon por esti tuj ekziligata kaj la tuta familio ruinigata!" Ŝi konstatas la danĝeron, sed ŝajne pli pro familia timo ol pro ideologia distanco. Laŭ la leteroj, Ada ŝajnas ne nur ne kontraŭfaŝisma, sed eĉ ĉiam iom pli simpatianta la ideologion. En januaro 1935 ŝi eĉ mencias sian engaĝiĝon: "Mi esperas aparteni al la Kultura Legiono [...] Mi nur devas studi la faŝistan leĝaron; mi esperas poste propagandi Esperanton." La ideo disvastigi Esperanton en faŝisma kadro montras naivan kredon je interpopola harmonio eĉ sub totalisma regado.

Sed eble la plej ŝoka estas ŝia letero el septembro 1935, en kiu ŝi pravigas la italan koloniismon en Afriko: "La eritrea





kaj somala popolo estas kontenta sub la itala regno, ili vivas bone, ne kiel bestoj.” Kaj poste: “La negroj estas kiel bestoj, ilia instinkto estas besta.” Jen la momento, kiam la persona voĉo de Ada dissolviĝas en la voĉon de sia epoko – kaj la amo malheliĝas.

La interpersona konflikto ekaperas dum 1935. Eduard ŝajne esprimas deziron pri fizika intimeco, al kiu Ada ne pretas konsenti. En unu letero Ada skribas kun doloro: “Laŭ miaj ideoj, ŝajnas al vi, ke ne oferante al vi mian korpon mi ne sufiĉe amas vin, ĉar tio estas granda amprovo.” Jen momento, kiam du personoj, formitaj de malsamaj kulturoj, atendoj kaj eble ankaŭ de malsamaj revoj, ne plu atingas unu la alian.

Poste la leteroj malmultiĝas. Fine, ili ĉesas.

Estas facile legi tiujn leterojn kiel romantikan anekdoton: junaj viro kaj virino, el malsamaj landoj, kuniĝintaj per Esperanto. Sed ilia valoro estas pli profunda. Ili estas inter la maloftaj ekzemploj de privata dokumentaro el la Esperanto-kulturo de la intermilita periodo. La plej multaj historiaj fontoj, kiujn ni havas, devenas el oficialaj revuoj,

kongresprotokoloj aŭ verkoj de elstaruloj. Sed ĉi tie ni aŭdas la voĉon de “ordinara” samideanino – sed kian voĉon!

Ŝi skribas pri sia hezito ĉeesti la kongreson de la Itala Esperanto-Federacio en Milano, malgraŭ ricevita invito. Ŝi priskribas siajn samideanojn jene: “ĉiuj bonaj kaj indaj personoj.” Kvankam ŝi partoprenas en la loka vivo, ŝi ne estas elstara figuro. Ŝi apartenas al tiu speco de esperantistoj, kiuj subtenis la movadon: diskretaj, kaj modestaj, sed revantaj pri pli bona mondo. Ŝia ideo propagandi Esperanton ene de la Kultura Legio de la faŝisma ŝtato montras, ke eĉ en ideologie kondiĉitaj strukturoj povis esti perceptataj ebloj por la lingvo de paco.

Ni ne scias ĉu ŝi restis loĝi en Ĝenovo, ĉu ŝi edziniĝis (kvankam ŝi sugestas tion en sia lasta letero), aŭ ĉu ŝi postvivis la militon. Eble ankaŭ ŝiaj infanoj aŭ genepoj iam trovos leterojn en skatolo. Aŭ eble ŝi por ĉiam malaperis en la fono, aŭ en la suferoj de la milito.

Marc van Oostendorp

Ĉi tiu artikolo aperis unue en Libera Folio.

Kie estas Heno?

En *Fenikso* 2/2025 aperis artikolo en kiu certan rolon ludis mia nepo Florian. Li havas nun la respektindan aĝon de dek monatoj. Kiam ni estas solaj, mi parolas kun li Esperanton – almenaŭ tiam, kiam mi ne krokodilas al li. Mi esperas, ke li eklernos la lingvon kaj interesiĝos pri la movado.

En decembro 2025 li festas sian unuan *Sinterklaas*. Kaj mi ne longe cerbumis, kion donaci al li...

De antaŭ nelonge mi povas diri, ke mi verkis libron. Nu ja... libreton. Temas pri la infanlibreto titolita *Kie estas Heno?*, kun la impresa eldonkvanto de... unu(!) ekzemplero. La celita legantaro ja ne estas tiel granda.

Temas pri spontane ekestinta ludeto, kiam miaj filinoj ankoraŭ estis etaj infanoj –ĉevalrajdado. Baldaŭ mi ĉevalumos kun mia nepo. Sed ankoraŭ ne. Nun li foje sidas sur mia sino dum mi voĉlegas la libreton pri Heno, la ĉevalo.

Estas kutimo, ke la donacon akompanas poemeto. Jen la mia:

Per ĉi-verko klopodas mi
la lingvon internacian instrui
al nepo mia, do al vi,
pensis mi: ni eku tuj.

Pri du fratinoj temas
La pli aĝa via panjo estas
Tiel mi jam semas
Antaŭ ol vi festas
unuan datrevenon vian.
Onklino via estas la alia
en tiu rakonto familia.
Ĝuu ĉi-klopodon mian.

Certe aferoj pli interesaj forpuŝos
la lingvon de via avo.
Kompreneble! Sed en iu niĉo aŭ kavo
Tiun donaceton iam vi retrovos.

Harm Voortman

Kara leganto de *Fenikso*,

Se vi volas konatigi Esperanton al via nep(in)o aŭ fil(in)o, eble mia libreto estos taŭga ilo – la rakonto estas rekonebla. Sendu retmesaĝon al harm.voortman@home.nl – se mi ricevos kelkajn mendojn, eble mi povus presigi kelkajn aldonajn ekzemplerojn. Tiukaze la mendantoj devus kovri nur la efektivajn kostojn, ĉar mi ne celas enspezi monon per tiu libreto. Ju pli da mendoj, des pli malmultekosta la libreto.

Amike,
Harm



Fotis la avino



Tatiana van Huis-Staritsky (1930–2025)

En la aĝo de 95 jaroj mortis Tanja van Huis-Staritsky, konata esperantistino el la harlema regiono. Ŝi naskiĝis en esperantista familio. Ŝia patrino dum longa tempo instruis Esperanton, ankaŭ en lernejo. La nomo *Tatiana* indikas ke estas rusaj originoj kiuj estas klarigeblaj per fuĝo de la patro el Ruslando. Tanja fiere montris ĉiam sian familian albumon kaj rakontis eĉ pri kozakaj rilatoj. La albumon kompilis unu el la genepoj. Kiam en 2019 mi havis usonajn gastojn, rusdevenajn, tiuj entuziasmiĝis pro la albumo dum vizito al Tanja en ŝia Esperanto-domo ĉe Leidsevaart kun la surskribo *Espero*.



Tanja estis sekretario kaj prezidanto de la harlema sekcio de Esperanto Nederland. Ŝi ĉiam varme akceptis geesperantistojn en sia domo. Dum longa tempo, kiam ŝi ankoraŭ povis vojaĝi, ŝi vizitis UK-ojn, korespondis kun alilandaj esperantistoj kaj ĉeestis la lekciojn en la Universitato de Amsterdamo kaj poste la kunvenojn de La Amsterdama Rondo. Lastatempe ŝi estis en flegejo en Heemstede.

Ni memoros ŝin kiel afablan, gastaman kaj helpeman esperantiston.

Bert de Wit



Bildo: Wikipedia (Joost Witteveen)

CO de UEA vendita kontraŭ 1,15 milionoj

Post kvarjara strebado Universala Esperanto-Asocio sukcesis trovi aĉetanton por la domo de la iama Centra Oficejo ĉe Nieuwe Binnenweg 176 en Roterdamo. La domo estos vendita kontraŭ 1,15 milionoj da eŭroj.

La estraro de UEA proponis en aŭgusto 2021, ke oni forvendu la domon kaj la komitato akceptis tiun decidon komence de 2022. Sekve la domo estis prezentita en la retejo *Funda* kun la prezo 1,5 milionoj da eŭroj. Tamen mankis interesiĝantoj. Laŭ la interna raporto la vera merkata valoro de la konstruaĵo estas 1,1 milionoj da eŭroj.

UEA devas liberigi la domon ene de 4 ĝis 6 monatoj. Ne estas klare kio okazos pri la libroservo, kiu daŭre funkcias en la sama konstruaĵo. Pro ĝia amplekseco, verŝajne ne estos eble transporti ĝin plene al la alia, malpli granda domo de UEA (*Volontula Domo*), kiu troviĝas ĉe la sama strato. UEA aĉetis ĝin en 2016 kiel loĝejon por la volontuloj. Nun ĝi transprenos ankaŭ la rolon de la oficiala sidejo de la asocio.



Benata Hengstmengel-Koopmans
✉ benata@zonnet.nl

Revuo-interŝanĝo estas projekto por prezenti enhavon de aliaj revuoj.

Monato

julio 2025, www.monato.be

- Eŭropa Unio kaj Sud-Afriko: plivastigo de reciproka kunlaboro, artikolo de Julius Hauser el Slovakio.
- Bert de Wit opinias, ke la nederlanda registaro malkoheras.
- Majorkaj aktivuloj defendas la katalunan, skribas Ferriol Macip el Katalunio.
- Kees Neeft rememoras papon Francisko, ĉi-jare sen la kutima "Dankon pro la floroj!"

La Informilo

n-ro 210, aprilo/majo/junio 2025,

<http://esperanto.france.est.free.fr>

Tiun ĉi dulingvan informbultenon mi ricevis dum la Universala Kongreso en Brno de s-ro André Grossmann, ĝia redaktoro, kiu loĝas en Baldersheim, en orienta Francio.



- En februaro 2025 Gbeglo Koffi kaj Michel Basso faris humanitaran vojaĝon al Instituto Zamenhof en Togolando.
- La grupo de Thionville organizis en Bavelo de la 23-a ĝis la 27-a de majo konferencon. Temis pri la 77-a SAT-Amikara Kongreso kaj la 89-a Regiona staĝo de Esperanto France-Est.

Dia Regno

n-ro 3 (972) 2025, <http://keli.chez.com>

- Sur la kovrilpaĝo: foto de grupo en Malagasio dum Kristana Esperanto-Seminario, kiun organizis pastoro Miora Raveloharison, kun financa subteno de la germana sekcio de KELI. En Brno ŝi estis elektita en la Estraron de UEA.
- Gerrit Berveling tradukis, el la latina lingvo, artikolon de Alkuino kaj Thiofrid *La vivo de Willibrord, ĉefepiskopo de Utreĥto*.
- Petro Chrdle el Ĉeĥio informas pri la fino de la Esperanta fako de la eldonejo KAVA-PECH.
- La 74-a KELI-kongreso, kiu estis nuligita en 2025, okazos de la 8-a ĝis la 15-a de aŭgusto 2026 en la orient-germana Görlitz, proksime al Pollando.



La Revuo Orienta

n-ro 5 (1230), 106-a jaro, majo 2025

- Sur la kovrila foto: Kataluna Esperanto-Junularo: La japanaj junuloj aktiviĝu kiel la katalunaj!
- JEI, Japana Esperanto-Instituto, jam duafoje havis budon dum la renkontiĝo de la Japana Konsilio por Instruado de Fremdaj Lingvoj
- Hori Jasuo tradukis prelegon de la Nobel-premiito pri paco por 2024: Neniam eĉ unu atomarmilon!

n-ro 6 (1231), 106-a jaro, junio 2025

- Artefarita intelekto (AI) lernas diligente ankaŭ pri Zamenhof: nun kun foto de Zamenhof 15-jara...
- Kio estas la spirito de "ne krokodilu!"? Artikolo de la magistriĝanta studentino Joyama Tsukika: Ne uzu vian propran lingvon, parolu en Esperanto.
- Rememoro pri la forpasinta Sasaki Teruhiro, la fondinto de la Internacia Esperanto-Muzeo de la Zaozhuanga Universitato en Ĉinio.

Ĉu metalo foje flosas sur akvo?

Ĉi-foje sen kalkulado... Nu, nur iom...

En mia lernejo mi faris simplan eksperimenton. Necesas nur prempinglo (sen plasta ĉapeto) kaj glaso kun akvo. Mi tenis la pinglon, ĉe la pinto inter la polekso kaj la montrofingro kaj metis ĝin kiel eble plej zorgeme sur la akvosurfacon – ĝi flosis (post tri malsukcesoj).

La spektantoj jam sciis, ke flosi aŭ sinki dependas nur de denseco. Vranka lignaĵo, ekzemple, flosas, dum la ferdeka luko rapidas al la marfundo. Grandaj ŝpaloj flosas, sed kiam oni perdas orelingon dum naĝado, ĝi sinkas. Ne la pezo sed la denseco – kiom da maso enhavas difinita volumeno – influas ĉu la objekto flosas aŭ surfundiĝas.

Post la eksperimento knabo diris, ke mia prempinglo ne estis el metalo. Mi montris al li la skatoleton, prenis novan kaj singarde kuŝigis ĝin apud la alia. Nun tiu insistulo diris, ke mia pakaĵo enhavas plastajn prempinglojn, do mi sendis lin al la pedelo por ricevi novan, ankoraŭ ne malfermitan skatoleton. Li revenis ene de du minutoj. Kiam mi flosigis prempinglon el tiu skatoleto, li asertis, ke mi kunlaboris kun la pedelo.

Do, mi pesis 50 prempinglojn el 'lia' skatoleto (15,2 g), metis ilin en mezur-cilindron kaj aldonis ĝuste 10 mL da akvo – la nivelo leviĝis ĝis 12,1 mL. Unu mL enhavis $15,2/2,1 = 7,2$ gramojn. Komparu akvon – unu mL da akvo pezas unu gramon. (Parenteze: kiu nombro ĉi-alinee ne gravas?)

Nun la knabo direktis siajn sagojn al la akvo sur kies surfaco 'flosis' la du prempingloj. Mi refutis lin senvorte: mi ĵetis la akvon en la lavujon, donis la glason al la obstinulo kaj kapindikis la kranon. Je la tria provo – du falis, la tria 'flosis' – lia insistito cedis al silento kaj miro. Kaj lia miro kreskos eĉ pli.

Por klarigi kial metalo povas 'flosi', ni rigardu la akvon je mikronivelo – la altiraj fortoj inter la akvomolekuloj. Molekuloj, kiuj estas tute ĉirkaŭitaj de aliaj, ne spertas netan forton. Sed tiuj, kiuj estas ĉe la surfaco, ne havas supran najbaron. Tial ekzistas neta forto – direktita enen, la t.n. *surfaca tensio*.

Se oni zorgeme surakvigas prempinglon, la surfaca tensio sufiĉas por subteni la pezon. Sed se oni ĵetas la prempinglon en la akvon, ĝi rompos la surfacon kaj la tensio ne plu povas helpi. Zorgemo necesas.

Eksperimento sen komplikoj, simpla kaj farebla de ĉiu, sed kiu malkaŝas kaŝitajn aferojn, en ĉi tiu okazo: nevideblan forton... Ho, tion mi ŝatas!

Sed mi ankoraŭ meditu iomete...

1. Sen surfaca tensio iuj insektoj kaj lacertoj dronus.
2. Sapo malaltigas tiun surfacan tension.

Sekve, sapo povas dronigi tiujn etajn estaĵojn.

Ĉu ni do abolu sapon? Ne! Sapo necesas por higieno kaj nia sano. Tamen ne senpripense ĵetu sapon en stratputojn. Ili estas destinitaj por pluvakvo, ni uzu la lavujon. La akvo de nederlandaj domoj iras al la akvopurigado, kie bakterioj detruas la sapmolekulojn. Krome, pripensu ĉu vere necesas purigi rubujon per sapo, mem lavi vian aŭton aŭ brospurigi la kahelojn ĉe la fronta pordo.



Dirinte tion, mi tuŝis la akvosurfacon en la glaso per fingro. Nenio okazis: la pinglo restis 'flosanta'. Sed kiam mi tuŝis la akvon denove, metinte guteton da sapo sur la fingron, ĝi tuj falis por akompani la aliajn sur la fundo. Falis ankaŭ la makzelo de la knabo...

Ni rigardu la naĝanton el la pasinta numero de *Fenikso*. Je kiu akvoflurapideco naĝanto estos ree plej rapide?


Ni nomu la flurapidecon F , tiun de la naĝanto N kaj la distancon D .

La bezonata tempo estas:
$$t = \frac{D}{N-F} + \frac{D}{N+F} = \frac{2DN}{N^2 - F^2}$$

Kiam F pligrandiĝas, la denominatoro malpligrandiĝas kaj la tuto pligrandiĝas. Se $F = N$, do la naĝanto naĝas same rapide kiel la fluo, la tempo estas infinita. Se $F = 0 \Rightarrow t = \frac{2D}{N}$, en ĉi tiu okazo 4 s.

Respondo: **nulo**, do senflua akvo.

Harm Voortman



Divenu la vorton laŭ la priskribo. La solvo konsistas el la unuaj literoj de la vortoj.

1							
2							

3					
4					
5					

6							
7							
8							
9							
10							
11							
12							
13							

14							
15							
16							

La solvo de la enigmo en la antaŭa numero de *Fenikso* (n-ro 4/2025) estas: **"Zomervakantie"**.

La ĝustan solvon sendis **Woomy, Frans Reibestein-v.d. Does kaj Rob Moerbeek**.

La ludo estas kreita de Det Koning. Sendu vian solvon al redakcio@esperanto-nederland.nl

Solvo:

1. Diri malveron

2. Kolora fluaĵo uzata por skribi

3. Persona pronomo de la tria persono en la pluralo

4. Organo de la vidkapablo

5. Disigi en la buŝo por la dentoj

6. Oficiala legitimaĵo

7. Perforte forpreni ion, kio apartenas al alia

8. Persona nedifinita pronomo
9. Komercaĵo

10. Estre esprimi al iu sian volon

11. Malriĉa dometo el krudaj materialoj

12. Afable peti iun ke li/ŝi venos

13. Natria klorido por gustigi manĝaĵon

14. Krei libron

15. Homido

16. Malpacienca

Studosemajnfino ĉe la sudaj najbaroj

Ankaŭ en Belgio okazas studosemajnfino, laŭ la konata kaj elprovita nederlanda modelo. En 2025 por la unua fojo okazis BEST – Belga Esperanto-Studosemajnfino – kaj pro la sukceso oni decidis okazigi la aranĝon ĉiujare. La dua BEST okazos en Ipro (Ieper) de la 20-a ĝis la 22-a de februaro 2026. La programo komenciĝos vendredon vespere kaj daŭros ĝis la dimanĉa posttagmezo. La kursoj okazos en kvar niveloj, en la junulargastejo *De Iep en 't Wikhof* – temas pri la sama loko kiel pasintjare, tie okazis ankaŭ la Beneluksa Kongreso en 2022.

Pliajn informojn kaj aliĝilon serĉu en Eventa Servo:

🌐 <https://eventaservo.org/e/BEST26>



BEST en 2025

Oproep voor bijdragen

Elk lid van Esperanto Nederland houdt zich op zijn of haar manier bezig met Esperanto, variërend van het bestuderen van de grammatica, het schrijven van gedichten of andere teksten, tot het ontmoeten van andere esperantisten, fysiek of op sociale media. We roepen je op om je ervaringen met ons te delen. Je verhalen zijn meer dan welkom, zowel in het Esperanto als in het Nederlands. Stuur ook foto's mee.

Grammaticale fouten corrigeren we. Inkorten en andere aanpassingen doen we zo veel mogelijk in overleg. Wanneer je wilt, kunnen we ook een interview

houden. Neem bij langere teksten eerst even contact met ons op. Stuur je bijdrage naar:

✉ redakcio@esperanto-nederland.nl

muziekrecensie gedicht
tekening evenement
vertaling verslag informatie
onderzoek brief boekrecensie aanbod
beeldverhaal beschouwing filmpje
foto's gamerecensie artikel
verhaal column
vraag fotoverslag

La Komencinto

Teksto kaj desegnoj: Thijs van Viegen



Studieweekend tijdens Pinksterweekend 2026

Van 5 t/m 7 november 2025 zijn we weer in het natuurvriendenhuis Krikkenhaar geweest. De deelnemers hebben alle lessen gevolgd. De maaltijden zijn weer verzorgd door Lilian en Marieke.

In 2026 gaan we weer twee weekenden organiseren.

Het eerste is **van 22 t/m 24 mei 2026**. Dit is het pinksterweekend. De kosten zijn € 105 voor leden van Esperanto Nederland, NEJ of een andere landelijke Esperanto-organisatie. Anderen betalen € 115. In de prijs zijn inbegrepen: lessen, overnachtingen, maaltijden, koffie en thee. Meer informatie en aanmeldingsformulier: esperanto-nederland.nl/studieweekend.

Subsidie mogelijk. Wil je graag deelnemen, maar is het te duur voor jou? Jongeren uit Nederland kunnen van Esperanto Nederland een tegemoetkoming in de kosten krijgen. Stuur dan een berichtje naar de organisatoren van het studieweekend.

Iets meer luxe? Wil je tijdens het studieweekend meer privacy? Een eigen slaapkamer? Denk dan eens aan het tweede huisje dat op het terrein staat. Het huisje heet 'Op den Haar'. Er zijn twee slaapkamers. Als je dit iets lijkt neem dan rechtstreeks contact op met de beheerder van Krikkenhaar.

Tweede pinksterdag. Het officiële studieweekend eindigt op zondagmiddag. Veel mensen zullen ook maandag een vrije dag hebben. Is het geen goed idee om je verblijf in Krikkenhaar te verlengen?

Spreek af met vrienden. Neem spelletjes mee. Ga een lekkere wandeling maken in de mooie omgeving. Kook je eigen maaltijd in de keuken van Krikkenhaar. Eerst studeren, en op zondagavond nog nagenieten. Of een fietstocht maken. Of gewoon lekker luieren.

Je kunt gebruik maken van een kamer in het Krikske, tegen gereduceerd tarief. Er zijn daar drie slaapkamers (met elk twee bedden). Neem contact op met Ineke.

De andere mogelijkheid is om – voor deze extra nacht - gewoon zelf een kamer te huren in het hoofdgebouw Krikkenhaar. Voor tarieven en zo kun je kijken op de website van de NIVON. Deze extra nacht regel je zelf en betaal je zelf ook!

Of je huurt het huisje Op den Haar voor het hele studieweekend en de extra nacht van zondag of maandag. Of alleen de extra nacht van zondag op maandag.

Even voor de duidelijkheid: de extra nacht in het hoofdgebouw of in Op den Haar regel je zelf. Dit gaat niet via Esperanto Nederland.

Tot ziens in Krikkenhaar,

Lilian, Arjen-Sjoerd en Ineke



PostNL
Port Betaald
Port Payé
Pays-Bas

Fenikso
Jarkolekto 30, n-ro 5/6
Septembro - Decembro 2025